

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtunda Radiostacio, pri la vivo en svisa montara vilaĝo.

En nia lando la internacia lingvo ne estas ankoraŭ tre disvastigata en la lernejoj. Tamen jam de ses jaroj ĝi estas instruata en la vilaĝo La Sagne. Vi certe havos plezuron aŭdi kelkajn gelernantojn de la lernejo de tiu vilaĝo prezenti al vi sian vivon. Kaj por eviti supraĵan priskribon de la kamparana vivo en svisa montara regiono ni dediĉos kvar elsendojn al tiu temo.

Sed unue ni prezentu al vi tiujn junajn gesamideanojn. Ni donu al ili la parolon.

Jacques Robert.- Mi nomiĝas Jacques Robert. Mi estas 13-jara. Mia patro laboras en la najbara urbo La Chaux-de-Fonds kiel horloĝisto. Li veturas tien ĉu per la trajneto, ĉu per sia aŭtomobilo. Mia patrino reprezentas en nia vilaĝo entreprenejon de kemia vestaĵlavado. Ŝi ludas rolon en la publika vivo kiel ano de la lerneja komisiono. Mi havas pli junan fraton.

Dua knabo ankaŭ nomiĝas Jacques.

Jacques Maire.- Jes ! Mi nomiĝas Jacques Maire. Mi estas 12-jara. Miaj gepatroj havas kafo-rostejon. Mi kaj mia fratinetto ilin helpas dum niaj liberaj horoj. Mi pakas la rostitan kafon. Ni ĉefe laboras por restoracioj. Mia patro devas multe veturi aŭtomobile por liveri la kafon al la klientoj. Mi ofte akompanas lin.

Ni turnu nin al la knabinoj.

Lise-Hélène Matile.- Mi nomiĝas Lise-Hélène Matile. Mi estas 13-jara. Mia patro veturas ankaŭ ĉiutage al La Chaux-de-Fonds por sia laboro. Li estas ŝoforo. Vintre li uzas la trajneton, dum la bela sezono li veturas per motorciklo. Mi ankaŭ havas patrinon kaj pli junan fraton.

Françoise Junod.- Mi nomiĝas Françoise Junod. Mi estas 13-jara. Mia patro estas la instruisto por la grandaj gelernantoj. Mia patrino havas multe da laboro, ĉar mi havas tri pli junajn gefratojn.

Ni finu tiun prezentadon donante la parolon al la plej juna. Li lernas esperanton nur de ses monatoj, dum la aliaj praktikas ĝin jam de du jaroj proksimume.

Alain Perrenoud.- Mi nomiĝas Alain Perrenoud. Mi estas 11-jara. Miaj gepatroj ambaŭ laboras ekster la vilaĝo, sed ne en la sama urbo, kiel tiuj de miaj gekamaradoj. Per sia aŭtomobilo ili veturas al Le Locle, ankaŭ najbara urbo. Mia patro estas ĉefmekanikisto kaj mia patrino oficistino. Ŝi nur iras al la fabriko posttagmeze. Matene ŝi restas hejme. Mi havas du pli grandajn gefratojn.

Jacques Robert.- Kiel vi rimarkis per tiu prezentado, la laboristoj, kiuj loĝas en nia vilaĝo, ofte laboras en najbaraj lokoj. Tamen ekzistas kelkaj laboreblecoj en la vilaĝo mem.

Françoise Junod.- En fabriko oni faras oscililojn por kronometroj. En tre malgranda fabriko oni okupiĝas pri gravurado. En kelkaj domoj fakuloj muntas horloĝojn. Ili poste ilin atente kontrolas.

Jacques Maire.- Ankaŭ ekzistas meblofabriko kaj bela meblomagazeno.

Alain Perrenoud.- Sed la plej granda parto de la vilaĝanoj estas kamparanoj.

Lise-Hélène Matile.- Ili posedas grandajn bienojn. Ili estas bovbredistoj. Ili devas rikolti multe da fojno por nutri la bovinojn dum la longa vintro. Somere la bovinaroj paŝtas en vastaj paŝtejoj. Ili tiam havas sonorilojn, por ke oni ilin facile retrovu.

Alain Perrenoud.- Tio faras belan muzikon.

Lise-Hélène Matile.- Per la lakto de tiuj bovinoj oni faras grandajn fromaĝojn nomataj Gruyères. Estas preskaŭ industrio. Pro tio en nia vilaĝo troviĝas tri fromaĝejoj.

Jacques Robert.- Niaj kamparistoj ne nur bredas bovinojn, sed ankaŭ porkojn kaj ĉevalojn. Ili ankaŭ havas multe da kokinoj kaj vendas multajn ovojn.

Françoise Junod.- Sed pro la alteco de nia valo ili preskaŭ nenion kultivas. Se ili semas grenon kaj plantas terpomojn, karotojn aŭ betojn, tio estas por si mem kaj ne por la vendo. Pri fruktoj ni ne parolu. Ili ne maturiĝas. Nur beroj kiel framboj, riboj aŭ grosoj maturiĝas, kaj tio nur je la fino de julio aŭ dum aŭgusto.

Jacques Maire.- Nia vilaĝo situas en unu el la plej altaj valoj de la ĵurasa montaro. Se vi ĝin volas lokigi, trovu mapon de Svislando kaj serĉu proksime de la lago Neuchâtel. Inter la Chaux-de-Fonds, Le Locle kaj Neuchâtel troviĝas nia valo. Ĝi estas orientita oriente-okcidente. Tio signifas, ke neniuj montoj nin ŝirmas kontraŭ la ĉefaj ventoj : ĉu la malvarma bizo, ĉu la pluvo- aŭ neĝo-riĉa okcidenta vento.

Lise-Hélène Matile.- Tiun ĉi vintron la termometro descendis ĝis minus 39 gradoj Celsius. Tiam ni preskaŭ ne plu povis iri eksteren, tiom la frosto pikis nin ĉe la kapo. Kun najbara valo, kiu ankaŭ situas pli alte ol mil metroj, nia valo ricevis la nomon Siberio de Svislando.

Françoise Junod.- Ĉar ni ne povas fieri pri milda klimato, ni almenaŭ fieradas pri tiu titolo. Kaj eĉ se la vintroj estas longaj, ni ilin ŝatas. Ni povas multe skii. Kaj malantaŭ niaj duoblaj fenestroj ni eble malpli suferas de la vintro, ol multaj popoloj, ĉar niaj domoj estas bone adaptitaj al tiu sezono.

Jacques Robert.- Nun ni estas meze de aprilo, kaj la kampoj kaj la arbaroj ankoraŭ dormas sub la neĝo. En majo la kampoj verdiĝos. En junio ni semos en nia ĝardenoj. En julio ni fojnos. En aŭgusto ni refojnos. En septembro la bovinoj revenos de la monto. En oktobro ni rikoltos la terpomojn kaj betojn. Ni tiam pretiĝos por la vintro, kiu komenciĝos kun la monato novembro. Jen la kalendaro en nia montara ĵurasa valo.

Jacques Maire.- Venontsemajne ni prezentos al vi nian valon kaj nian vilaĝon. Sed jam antaŭsciu, ke ĝi estas eksterordinare longa. De la unua domo ĝis la lasta estas du horoj de marŝado !

Vi aŭdis geknabojn el svisa montara vilaĝo. Se vi deziras ricevi bildon de tiu vilaĝo, skribu al Radio-Svislando. Kaj se vi volas reaŭdi la voĉon de viaj junaj gesamideanoj, ne forgesu, ke niaj elsendoj okazas ĉu merkrede je la 13h20, ĉu ripete sabate je la 22h15 sur la bendoj 48 metroj, 31 metroj, 25 metroj kaj 19 metroj.

Ĉiuj.- Ĝis reaŭdo !

-oOo-